# KOMUNIKOJ


TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Jaro 37-a BRAZILO, OKTOBRO-NOVEMBRO-DECEMBRO 2013 N-ro 152


"Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem."
JESUO (*Mt*, 22:37-40).

"Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro."
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo.* Ĉap. 19, §7.

"Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian."
ZAMENHOF. *La Espero*.



## LA STALTROGO

La staltrogo signis la komencan punkton de la savanta leciono de la Kristo, kvazaŭ dirante, ke humileco estas la ŝlosilo de ĉiuj virtoj.

Tiam komenciĝas la definitiva erao de la spirita plenaĝeco de la surtera Homaro, ĉar Jesuo, per sia dia ekzemplado, transdonos al ĉiuj koroj sian kodon de frateco kaj amo.

Vane la materialismaj verkistoj de ĉiuj tempoj diskonigis la grandan okazaĵon, priironiante la altajn mediumajn fenomenojn, kiuj antaŭiris ĝin. La figuroj de Simeono, Anna, Elizabeta, Johano la Baptisto, Jozefo kaj ankaŭ la plej pura persono de Maria multfoje estas objekto de maljustaj kaj malicaj kritikoj; sed vere estas, ke nur per helpo de tiuj kurieroj de la Bona Novaĵo, portantaj la kontribuaĵon de fervoro, kredo kaj vivo, Jesuo povis ĵeti sur la Teron la fundamentojn de la neskuebla vero.


*Emmanuel*

XAVIER, Francisco Cândido. *Sur la vojo al la lumo*. Diktita de la Spirito Emmanuel. El la portugala lingvo tradukis A. K. Afonso Costa. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 1974. ĉap. 12 – La alveno de Jesuo.

## FINFINE, ALMANAKO LORENZ 2014 ALVENIS!

La lanĉon de **ALMANAKO LORENZ 2014**, ni efektivigos okaze de la Brazila Kongreso de Esperanto, en Florianopolo, kaj ankaŭ en la Universala Kongreso, en Argentino. Tamen, jam eblas ĝin akiri hodiaŭ mem kaj legi interesajn artikolojn, kiel ekzemple de **JARMILA RÚZNAROVÁ** (Ĉehio) pri la temo Miaj travivaĵoj en la dua mondmilito – rememoro; **RENATO CORSETTI** (Italio): Ke la Amo Regu niajn Korojn; **TREVOR STEELE** (Aŭstralio): Sciencismo kaj skeptikeco; **ROY MACCOY** (Nederlando/Usono): Tiam kaj Nun: Kelkaj Rimarkoj post 25 jaroj en la Centra Oficejo de UEA… kaj ankaŭ tre interesajn kronikojn de brazilanoj kaj riĉan intervjuon kun la brazila veterano **AFFONSO SOARES**. Do, karaj, jen grava oportuno por akiri la enhavriĉan ALMANAKO LORENZ 2014!


Lanĉa prezo: 3 eŭroj



## AMIKOJ DE LORENZ

KOMUNIKOJ plezure omaĝas en ĉi tiu numero nian karan aŭstralian amikon TREVOR STEELE. Li estis prezidanto de Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj ĝenerala direktoro de la Centro Oficejo de UEA. Li multe kunlaboras kun Asocio Lorenz. Ni prezentas al li nian koran dankon kaj estimon!

En **ALMANAKO LORENZ 2011** ni trovas intervjuon de samideano TREVOR STEELE:



*"Esperanto estas pli ol nura lingvo. Kaj unu kialo por la ĝisnuna modesta progreso de Esperanto estas, ke la homaro ankoraŭ ne estas sufiĉe matura por akcepti ĝin kaj ĝian internan ideon. Sed en nia epoko ni eble devas elekti novan manieron tion esprimi."*

*Trevor*



**KUNLABORU! COLABORE!**
**Membriĝu ĉe LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!**

*Associe-se à LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!*

## POEMOJ EL LA PLI GRANDA MONDO

### Kristnaska Mesaĝo

En la tuta mondo la kristana rondo
en preĝejaj festoj kaj per korespondo
Kriston rememoras, multaj Lin adoras,
kaj la sonoriloj en ĝojkant' sonoras.

Sed malmultaj scias, ke – se l' mond' mencias
tiun sanktan Nomon, Lin ĝi ne konscias –
Kristo, la Mesio de l' plej bona Dio,
venis al la mondo, alta kun misio:

instruadi Veron, de l' spirit' Liberon,
al ĉiela vivo similigi Teron.
Per naskiĝ' humila, per labor' utila,
per la granda amo, per instruo brila

montris Li la vojon por atingi ĝojon
veran, kaj forlasi jam la lastan fojon
dubojn kaj eraron, de l' malbon' la maron,
kaj per sinofero servi la homaron.

Estu la instruo viva de Jesuo
klara vojo al la homa evoluo:
de infano plora al la vir' labora,
de la mort-elspiro al Spirito glora!

25/12/1943.

*Antoni Grabowski* [Spirito].

LORENZ, Francisco Valdomiro. *Voĉoj de poetoj el la spirita mondo*. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 1987. 2. eldono. p. 41.

LORENZ

**"KOMUNIKOJ"**

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975
Jaro 37-a – n-ro 152 – Oktobro-Novembro-Decembro 2013

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

**KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:**

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonoj: + **55-21-2221-2269** | + **55-21-2450-4768**
Skajpo: **Lorenz Editora** | Fejsbuko: **Editora Lorenz** | Retadreso: **editora_lorenz@uol.com.br**



Kompostita de Rogério Mota

# Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof

Al Guminskij, 1890

Tre estimata amiko!

La 20 milrejsojn mi ricevis kaj mi sendas al vi mian koran dankon en la nomo de nia amata afero. En la komenco mi intencis sendi ilin al s-ro Schmidt por la kaso de la Ligo internacia, sed la Ligo en ĝia nuna formo estas fondita sen mia scio kaj sen mia volo, kvankam la redaktoro presis la Regularon en mia nomo kaj kun mia antaŭparolo. (Mi kreis Regularon tute alian; sed s-ro Schmidt ne dirante al mi eĉ unu vorton ŝanĝis la tutan fundamenton de mia regularo kaj donis al ĝi sub mia nomo tian formon, kian mi tute ne povas aprobi*.)

Ne sciante ankoraŭ kio estas kun la Ligo, kaj timante ke ĝi en ĝia nuna formo ne povos sin teni, mi decidis reteni ankoraŭ vian monon ĉe mi, ĝis la afero de la Ligo klariĝos aŭ ĝis vi mem skribos al mi kion mi devas fari kun la mono.

Plenumante vian peton, mi sendas al vi nun mian fotografaĵon kaj mi petas vin akcepti ĝin kiel signon de efektiva estimo kaj memoro. Mi petas vin ankaŭ honori min per via fotografaĵo, kiu estos por mi tre kara. Kun granda plezuro mi vidas, ke vi ne forgesas nian aferon kaj propagandas ĝin konstante. Dio donu al via laborado la plej bonajn rezultatojn.

L. Zamenhof

* Por eviti tiajn surprizojn kiujn faras al mi s-ro Schmidt, mi intencas baldaŭ preni la tutan kondukadon de la afero en mian propran manon.

IOM Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof: originalaro 1: unua etapo de Esperanto: 1878-1895. Tokio: Eldonejo Ludovikito, 1989. p. 313-314.


## PARTOPRENU EN FLORIANOPOLO, JANUARE 2014, LA BRAZILAN KONGRESON DE ESPERANTO KAJ LA BRAZILAN RENKONTIĜON DE ESPERANTISTOJ-SPIRITISTOJ







**ESPERANTA AMBASADEJO** – Kreiĝis tre interesa projekto en la urbo "Pouso Alegre", ŝtato "Minas Gerais". Laŭ la organizantoj, ESPERANTA AMBASADEJO temas pri "sekura haveno" por esperantistoj, kaj ankaŭ loko por ke neesperantistoj sciu pli pri la lingvo. Disponeblas servoj kiel helpo pri gastado ĉe la urbo, informoj pri turismaj lokoj en la regiono, interreta konekto kaj bongusta kafo. Konu ĝian retpaĝon ĉe: https://www.facebook.com/esperantaambasadejo.



# MEMORAĴOJ DE SINMORTIGINTO

[...] Sed mankis al mi la frata idiomo de la estonteco, tiu netaksebla trezoro de la homaro, kiu ĉi tiun envolvos en brakumo unuigonta rasojn kaj popolojn, kiuj interfratiĝos por la konkero de la sama idealo: – la progreso, la harmonio, la civilizacio lumigita de Amo! Ĝia lernado, kiel cetere ĉiuj aliaj plenumotaj taskoj, estis nedeviga, sed la inicitoj ĝin aparte rekomendis al ni, reliefigante ĝian trean gravecon, ĉar tiu idiomo, kies simbola nomo estas la sama kiel tiu de nia Universitata Urbo, nome, Espero – (Esperanto) –, solvos eĉ transtombajn problemojn, permesante al la superaj Spiritoj efike kaj brile komunikiĝi pere de literaturaj kaj sciencaj verkoj, kiujn la surtera mondo emas ricevi el la nevideblo en la estonteco – helpe de mediumoj, ankaŭ akirintaj tian kapablon kun la celo bone servi al la imperativoj de la misio, kiun, en la nomo de la Kristo kaj pro amo al la Vero kaj al la elaĉeto de la homaro, ili devos plenumi.

*Kamilo Kandido Boteljo*

PEREIRA, Yvonne do Amaral. *Memoraĵoj de Sinmortiginto.* Diktita de la Spirito Kamilo Kandido Boteljo. [Reviziita de la Spirito Léon Denis]. El la portugala lingvo esperantigis Affonso Borges Gallego Soares. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz, 1998. Tria parto – La universitata urbo. ĉap. 7 – Lastaj trajtoj.

## NOVAJ LANĈOJ!!

**ELDONEJO LORENZ** lanĉas du librojn en la portugala lingvo: “Jonas, o contador de histórias” (*Jonas, la rakontisto*) kaj “Um sonho... Natal todos os dias” (*Jen revo... Kristnasko ĉiujn tagojn*). Du belaj verkoj kiuj parolas pri la vivo kaj espero, survoje al la renkontiĝo kun la Kristo. Profitu la okazon kaj la rabaton. Aĉetu tuj la vian! Vi meritas!




Pela mediunidade de GERALCINO GOMES, os bons Espíritos trazem a bela mensagem de um sonho, que o Natal seja todos os dias, sentido, de fato, em nossos corações.
MEIMEI, MARIA DOLORES, IRMÃ SCHEILLA, NOEL ROSA, MILECCO, FREI SAMUEL, FREI VICENTE, TAIGUARA e RUY KREMER são alguns dos articulistas espirituais que colaboraram para trazer este belo presente de Natal para todos nós.



Geralcino Gomes (médium)

EDIÇÃO LIMITADA.
APROVEITE O PREÇO PROMOCIONAL DE LANÇAMENTO.



Jorge Pedreira de Cerqueira
(autor)

Jonas é como aquele experiente professor, que nos pega pela mão e anda conosco pelos bosques perfumados, mostra as aves que cantam canções que ninguém lhes ensinou, o céu luminoso, os verdes de muitos tons, que acalmam, e nos faz sentir o beijo da brisa fresca da manhã que nasce. Assim, andando juntos pelos caminhos do Cristo, reunimos forças para que, lá adiante, possamos caminhar por nós mesmos, porque teremos vivido e crescido, porque passamos a ser novas criaturas a caminho do grande encontro com o Cristo, reabastecidos nas fontes inesgotáveis do Pai.

*Cesar Soares dos Reis*

R$22,00



# ESPERANTISTAJ POETOJ

## KREDO

1952

Venkivas nur la kredo,
Kaj kredon kreas amo;
Dum amo restos arda,
Efikos nia pledo,
Sed kiam amo velkos
Sub ŝimo de malam',
La kredo jam velkivos,
La tag' noktiĝos jam.

L' afero estas forta
Pro nia forta kredo,
Sed kredo ne postvivos,
Se l' amo kuŝos morta,
Kaj kiu apatias
En kaŝa korangul'
Fivendas la aferon —
Senpensa perfidul'.

Rigardu en la koron! —
Se amo floras tie
L' afero prosperadas,
Peradas vi valoron;
Kaj se vi firme tenos
La amon en posed',
L'afero fine venkos:
Venkivas nur la kred'.

Poemo de William Auld el la verko *En barko senpilota: plena originala poemaro*, eldonita de Edistudio en 1987.



WILLIAM AULD (1924-2006), skoto, eklernis E-on en 1937. Li estis redaktoro de pluraj gazetoj kaj revuoj; vicprezidanto de UEA (1977-1980) kaj prezidanto de la Akademio de Esperanto (1979-1983). Krom brila originala poeto, li elstaras ankaŭ en la literaturo de Esperanto per vasta kvanto de plejparte brilaj tradukoj. Verkis kvar lernolibrojn k plurajn eseojn kaj estis plurjare Kandidato por la Nobelpremio por Literaturo. (Resumo el informoj trovitaj en *Ordeno de Verda Plumo: leksikono pri esperantlingvaj verkistoj*, verkita de Josip Pleadin k eldonita de Grafokom en 2006.)

# UNIVERSALECO DE L' INSTRUADO DE LA SPIRITOJ

*La sola serioza garantio de l' instruado de la Spiritoj estas la akordo, ekzistanta inter la malkaŝoj spontanee faritaj, pere de granda nombro da mediumoj fremdaj inter si, kaj en diversaj landoj.*

*Ne al la opinio de unu sola homo oni aliĝos,* sed al la unuanima voĉo de la Spiritoj; ne unu homo, *ĉu mi, aŭ alia,* fondos la spiritisman ortodoksecon; ne ankaŭ unu Spirito, trudanta sin al iu ajn, sed ja la tuto de la Spiritoj, manifestiĝantaj sur la tuta tero laŭ ordono de Dio; tie estas la esenca karaktero de la spiritisma doktrino; tie kuŝas ĝia forto, tie ĝia aŭtoritateco. Dio volis, ke Lia leĝo sidu sur neskuebla bazo, kaj tial Li ne ripozigis ĝin sur la malforta kapo de unu sola homo.

KARDEC, Allan. *La Evangelio laŭ Spiritismo.* El la franca lingvo tradukis Ismael Gomes Braga. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 2008. Enkonduko. § 2 – Aŭtoritateco de la Spiritisma Doktrino.

**ESPERANTA KUNFRATIĜO DE OKCIDENTA REGIONO (EKOR)** REALIGAS AGO-TAGON 2013 EN RIO-DE-ĴANEJRO – En ĝoja etoso, EKOR disvastigis Esperanton en la kvartalo Bangu. La libro *Esperanto*, verkita de Homarano, estis senpage disdonita al ĉiuj homoj, kiuj interesiĝis. La samideanoj kunfratiĝis post la laboro en la sidejo de Esperanto-Grupo Ismael Gomes Braga, unu el la pluraj Esperanto-grupoj partoprenantaj en EKOR. Pliajn informojn pri la agado de la Kunfratiĝo oni trovu ĉe: ekor.esperanto@yahoo.com.br.



# KRISTNASKAJ LUMOJ

Ekde kiam Jesuo naskiĝis sur la Tero, transformante la malĝojan pejzaĝon de la Planedo, Li atendas, ke ĉiu koro fariĝu nova Staltrogo, por ke Lia Amo reaperu inter la homoj...

La moderna mondo atingis la progreson de la aferoj, disponigante ilin al la homa distriĝo, por komforto de la socioj...

Kaj tiel, Sankta Nikolao ekfariĝas la ĝojo de la infanoj; la kristnaskaj festoj alportas motivon por kunsidoj de familioj, amikoj, personoj... Donacoj interŝanĝitaj vidigas la konsideron, la dankemon, la korinklinon... Kaj eĉ la lacigaj antaŭarangôj por la Granda Simbola Nokto stimulas la laboron, la sindonemon, la koran kunfandiĝon, farante el la socio, tiam regata de la kristnaska etoso, abelujon plenan de unu sola ideo kaj unu sola sento...


Miaj gefratoj, la Sinjoro neniam ĉesis ĉeesti kune kun ni.

Same kiel la beligita kovrilo gardanta donacon estas manifestiĝo pri la zorgo kaj ŝato de tiu, kiu volas honori iun alian, tia movado ĉirkaŭ la Kristnasko estas pura influo de la povo de Jesuo super ĉiuj ni!...

Ankaŭ ni, en la Spirita Vivo, estas tuŝitaj de la povaj vibradoj memorigantaj nin pri la naskiĝo de la Majstro sur la Tero. Kaj tial, uzante la evidentan noblecon kaj la inspiron naskitan de la bona volo, ni kunfratiĝas al vi ĉiuj por kanti, ene de karitato kaj fido, frata amo kaj anima dankemo, la laŭdajn himnojn al Lia koro: la dia datrevenfestanto – Nia Sinjoro Jesuo-Kristo!

*Meimei*

Mesaĝo psikografiita de la mediumo Wagner Gomes da Paixão, dum publika kunsido de Spiritisma Grupo de la Beno, en la urbo "Mário Campos", ŝtato "Minas Gerais", Brazilo, la 21-an de Novembro 2011.




# EL LA EVANGELIO

*Kaj mi petos la Patron, kaj Li donos al vi alian Parakleton, por ke li restadu kun vi por ĉiam; tiu estas la Spirito de la vero, kiun la mondo ne povas akcepti, ĉar ĝi lin ne vidas nek konas; vi lin konas, ĉar li restadas kun vi kaj estos en vi. Johano 14:16-17.*

Dio konsolas la humilulojn kaj donas al ili la forton, kiun ili petas de Li. Lia potenco kovras la teron, kaj ĉiam apud larmon Li metis ian balzamon. La sinoferado kaj la abnegacio estas senĉesa preĝado kaj enhavas profundan instruon; la homa saĝeco loĝas en tiuj du vortoj. Ĉiuj suferantaj Spiritoj povu kompreni ĉi tiun veron, anstataŭ plendi kontraŭ siaj doloroj, la moralaj suferoj, kiuj estas destinitaj por vi sur la tero. Prenu do kiel devizon la jenajn du vortojn: sinoferado kaj abnegacio, kaj vi estos fortaj, ĉar ili resumas ĉiujn devojn, kiujn de vi postulas la karito kaj la humileco. (La Spirito de Vero)

KARDEC, Allan. *La Evangelio laŭ Spiritismo.* El la franca lingvo tradukis Ismael Gomes Braga. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 2008. ĉap. 6 – La konsolanta Kristo. § 8 – Regado de la Spirito de Vero.